

5 ☆ 1995 ☆ 166

STARTO

ORGANO DE CEĤA ESPERANTO-ASOCIO

La 37-a Internacia Fervojistaro

E-o Skisemajno



☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
aperas 6-foje jare. Abono 15 gld.

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio,
800 Kč por kvaropaĝo, 1500 Kč por
duopaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%
rabato.

Membrokotoj: A 120 Kč, B 60 Kč, C
300 Kč, D 30 Kč, E 30 Kč, F 2400 Kč, G 90
Kč (Starto), eksterlandanoj 20 ECU, enskribo
20 Kč.

HEROLDO DE ESPERANTO

Chcete být aktuálně informováni o espe-
rantském hnutí v celém světě? Neváhejte
a předplaťte si Heroldo de Esperanto,
které vychází 16x ročně. Cena před-
platného pro rok 1996 zůstává nezmě-
něna ve výši 400,- Kč. Úhradu můžete
provést v každé pobočce Agrobanky na
číslo účtu vedeného u Agrobanky v
Poděbradech 429 531 - 584/0600.
Distribuci provádí a další informace
poskytne: Pavel Polnický, Lesní 150/VI.,
290 01 Poděbrady (tel. 0324/5651). Na
tuto adresu pošlete prosím informaci o
zaplacení a přesnou adresu, na kterou
chcete HdE dostávat!

HEROLDO
DE ESPERANTO
LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

JAK NA KONGRES

Důležitá informace pro zájemce o účast
na 81. UK v Praze v roce 1996. Espe-
rantisté z České republiky mohou platit
kongresový poplatek v každé pobočce
Agrobanky, kterých je v ČR celkem
365. Zvláštní účet byl otevřen v Agro-
banke v Poděbradech a má následující
číslo: 411 200 - 584/0600. Řádně vy-
plněnou zvláštní přihlášku pro občany
ČR a SR zasílejte na adresu pokladníka:
Pavel Polnický, Lesní 150/VI., 290 01
Poděbrady (tel. 0324/5651). Na této
adrese obdržíte i další přihlášky a infor-
mace. Do kanceláře UEA v Rotterdamu
přihlášku neposílejte! (Výše kongre-
sového poplatku pro naše občany bude
známa a přihlášky k dispozici až kon-
cem října!!!)

Al ĉiuj, kiujn turmentas doloroj

Mi petas, tralegu denove en Starto 1/95,
p. 7, la artikolon *Ĉu vi konas kuracajn
kolorajn foliojn?* Ĝian enhavon mi tute
konfirmas, ĉar tuj post ĝia tralego mi
skribis al s-ro L. Hruška el Písek, kiu
tuj poŝtrevene sendis al ni 3 folietojn
laŭ nia priskribo de malfacilaĵoj. Mi kaj
edzino jam unu monaton almetadas ĉi
tiuajn foliojn sur dolorajn lokojn de niaj
korpaj. Ni ambaŭ plicertigas, ke niaj
doloroj iom post iom cedas!

Dum la nuntempa plimultekostigo de
medikamentoj kaj kuraciloj estas ĉi tiu
kuracmetodo male pli efika koncerne kaj
resaniĝon kaj monon.

Ripetante, mi rekomenas al vi: Skribu
al s-ano Hruška, ĉar la kuracfolioj
pruviĝis - montris sian kapablon
resanigi! Dankon!

Miroslav Pokorný, Ústí n.O.

Informoj el la komitato de ĈEA

Laŭ aŭgusta komitatsesio okazis en la urbo Česká Třebová kaj la septembra en Brno. Ambaŭ havis la samajn program-erajn ĉefpunktojn: unue ekonomiaj problemoj, ĉar la ekonomio estas bazo por bona prospero de la asocio. Kvankam financoj ne abundas, tamen al la socio nun ne minacas financa kolapso. Sed gravas ĝustatempa pago de la membro-kotizoj por venonta jaro 1996 (laŭstatute oni devas tiun membran devon plenumi antaŭ komenco de la koncerna jaro, do fine de la jaro antaŭa).

Regule estas detale traktata la membrostato kaj lige kun tio ankaŭ la asocia organo Starto. Ĝi jam unuafoje aperis en Opava kaj baldaŭ estas antaŭvidata la ĝusta eldonritmo (*en paraj monatoj - rim. de red.*). Tamen la membrokartoteko iomete lamas, multaj membroj ĝis nun ne resendis la novan membrokarton ricevitan komence de la jaro. Ja ekzistas eĉ kluboj, kiuj tute ne sendis sian membroliston kaj ankaŭ ne kotizojn por tiu ĉi jaro 1995! Malgraŭ tio la klubo ekzistas kaj ankaŭ funkcias. Simila negativa disciplino estas grava malhelpo de la asocia agado!

Gravaj punktoj de ambaŭ kunvenoj estis kongresoj. En la aŭgusta estis pritaksataj la rezultoj de la 48-a IKUE-kongreso en Olomouc, pri kiu jam nia organo sufiĉe informis. La komitato esperimis altan respekton al perfekta preparo de la kongreso fare de ĝia organiza teamo surfrunte kun Miloš

Šváček. En la sama kunveno estis la komitatanoj detale informitaj pri UK en Tampere, la septembra kunveno traktis laboron de LKK, kiu havis sian specialan sesion 9.9. en Praha kun ĉeesto de Simo Milojevič, la ĝenerala direktoro de UEA.

La plej longan tempon de la kunveno forprenis la preparo de la asocia konferenco preparata por dua duono de oktobro, kiu ligiĝas kun la festivalo „Filmo kaj video en Esperanto“, kiun en Brno komune aranĝas ĈEA kaj KAVA-PECH.

La programon de la kunvenoj kompletigis vico da malpli ampleksaj problemoj: faka asocia biblioteko, kiun prizorgas la scienc-teknika sekcio de ĈEA (nome inĝ. Pospíšil), plue stato de UEA-membroj en nia lando, funkciado de lokaj kluboj kaj aliaj. La venonta kunsido okazos nur post la konferenco, kiu resumos rezultojn de la asocio.

VI-Ko


Esperanto-tago en Opava

En la urbo Opava - la naskiĝloko de la elstara ĉeĥa poeto Petr Bezruč - regule okazas en septembro la kultura festivalo „Bezručova Opava“ (Opava de Bezruč), kiu havas jam 38-jaran historion. En pasinteco estis kelkfoje en la semajna bunta programo ankaŭ esperantista parto - estis tio entute 6 Esperantaj Kulturaj Festivaloj. En la ĉijaran programon oni envicigis laŭ propono de Esperanto-rondeto Ostroj Opava la Esperanto-tagon. Ĝi efektiviĝis

sabate la 16-an de septembro. Partoprenis ĝin kvar dekoj da esperantistoj el Opava kaj ses aliaj lokoj de Pŕerov ĝis Třinec. La programo enhavis referaĵojn el historio de la movado en Ostrava-regiono (V. Kočvara, ing. K. Janouš), projekciadon de „historia“ filmo pri komencoj de la someraj Esperantotendaroj en Žimrovice (1952-1956). Krome oni faris mallongan promenon tra la urbo kaj vizitis la ekspozicion pri 50-jara historio de Silezia teatro en Opava, kiu cetere en la jaro 1968 surscenigis en Esperanto dramon de V. Nezval „Manon Lescaut“ en traduko de J. Kořínek.

La renkontiĝo havis ĉefe lokan dimension, sed ĝi tamen efike propagandis nian movadon. Pri la festivalo „Bezručova Opava“ multfoje kaj vastskale informis publikaj komunikiloj kaj ĉiam oni menciis ankaŭ la Esperantotagon, kiu grave riĉigis la programon de la festivalo. Ofte estis akcentigita la partopreno de interesuloj el lokoj ekster Opava. Jen la ĝusta maniero envicigi Esperanton en publikan kulturalan vivon.

kov.



Grava internacia evento en Jeseníky-montaro

Inter la 18-a kaj 24-a februaro 1995 okazos en Kouty nad Desnou (Jeseníky-montaro) la 37-a Internacia Fervoĵista Skisemajno. Estas preparita programo kaj por skiantoj kaj por promenantoj. Por partoprenantoj de Ĉeĥio kaj Slovakio, kiuj aliĝos (sindevige, do kun pago de la kotizo) ĝis la fino de novembro ĉijara, ekzistas altaj rabatoj. La prezo respeguligas la nivelon de tranoktado: estas tri kategorioj, ekde la plej luksa en la hotelo Dlouhé Stráně (longaj deklivoj) ĝis modesta en du kaj trilitaj ĉambroj kun duŝejo kaj necesejo suretaĝe en la hotelo MEZ. Por tiu modesta tranoktado kun duonpensiono, se pagite ĝis la fino de novembro, ĉeĥaj kaj slovakaj partoprenantoj pagos nur 1140,- Kč (en trilita ĉambro) aŭ 1320,- Kč (en dulita ĉambro) por la tuta restado.

Partopreni la eventon kaj ĝui la Esperanto-etoson kaj belan vintran montaron povas ĉiuj esperantistoj, tamen nur membroj de IFEF ricevos medalojn kaze de sukceso en diversaj konkursoj aranĝotaj. Vesperaj kulturaj programoj (inter ili ankaŭ la lingva konkurso) okazos por ĉiuj partoprenantoj en la hotelo Dlouhé Stráně.

Pli detalajn informojn kaj aliĝilojn vi ricevos ĉe la organizanto: KAVA-PECH, Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, Tel: (02) 991 2201, Fax: 991 2126.

Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature 6

Josef Kavka

-UM-

La sesan (v. *STARTO*, 1994, 4, 20-21 kaj 5/6, 23-26, 1995, 1, 12-14, 2/3, 17-19, 4, 8-11) ĉapitron de niaj konsideroj ni dediĉu al la problemo de la radikfina -UM-, per kiu Esperanto kelkfoje klopodas eviti homonimecon. Ni provos demonstri, ke tiaspeca klopodo apenaŭ povas esti taksata kiel bonŝanca.

La latina -UM- normale ne konsistigas radikon, estante finaĵo neŭtra. Ekz. en *verbum*, genitive *verbi*, la radikon formas sole tiu *verb*. Tion prave respektis la kreinto de Esperanto per la fundamenta vorto *verbo* (ne "verbumo"; cetere kp. *en: verb, fr: verbe, it: verbo, sp: verbo* k.t.p.).

Estas simptomo, ke inter la **fundamentaĵoj** ni vane serĉus ion analogan al "verbumo". Kukumoj (*Cucumis*) estas fenomeno alispeca, same kiel konsumi, kostumo, parfumo, resumo kaj volumo.

Okulfrape alia situacio montriĝas inter la **oficialaĵoj**: albumo, forumo, harmoniumo, mediumo kaj minimumo ĝuste analogas al la supra, teorie konstruita modelo "verbumo": Ĉu ne estus interese scii, kial Lingva Komitato kaj la posta Akademio de Esperanto hezitis kontentigi sin pri la planlingve logikaj: albo, foro, harmonio, maksimumo, medio kaj minimo? La homonim-okazoj ja estis neglekteblaj.

Da **neoficialaj** -UM-aĵoj ĉi-koncernaj **svarmas** en PIV multe pli:

1. cekumo (*caecum*), eĉ cekumito (ĉu ne pli eble apendicito?);
2. eratumo (*erratum*). Prave oni dubu, ĉu necesa termino anstataŭ la perfekte kompreneblaj erarlisto, eraroj k.s.;
3. filtrumo (*philtrum*). Ĉu la vizaĝa anatomio havas ion komunan kun filtrado? Do eventuala konfuzo de la malparencaj nocioj apenaŭ okazus;
4. galiumo (*Gallium*): Ĉi-okaze, PIV prave referencas al galio 2, kiu ja estas senriproĉe akceptebla (kp. *Portmann-Rogers*, 1993: galia arsenido);
5. geumo (*Geum*): kial ne sufiĉus: geo?
6. heliumo (*Helium*), laŭ PIV zamenhofaĵo lanĉita fare de *Kalocsay*; tamen, la ĥemiistoj klare inklinas al helio;
7. hilumo (*hilum*, genitive *hili*): Se la zoologoj evidente ne timas konfuzon de l' amfibia hilo (*Hyla*) kun la termino anatomia (*hilus*), kial timas la botanikistoj? Jen kiel dokumentiĝas subjektiveco de la homonimfobiaj afekcioj...
8. iliumo (*os ilium*): Ĉi-okaze eĉ PIV preferas la logike formitan ilion, al kiu ĝi mem referencas;
9. indiumo, laŭ PIV ankaŭ zamenhofa, estas same garnita per referenco al indio (it: *Indio*), pri kies form-ĝusteco la ĥemiistoj-esperantistoj neniel dubas;
10. kambio (*cambium*): jen ree timo de la PIVa botanikisto, ke povus okazi miskompreno kun laambio financa;
11. krinum (*Crinum*) el amarilidacoj certe devus esti nomata krino, apenaŭ konfuzebla kun ĉevalharo;
12. kvantumoj estas en PIV difinita kiel
 1. elementa unuo de fizika grando, 2. elementa korpusklo kun nula aŭ entjera

spino. Aliflanke kvanto laŭ PIV estas 1. pii aŭ malpli granda mezuro aŭ nombro da objektoj aŭ personoj, 2. esprimo de granda en geometrio. Atendinde: en etnolingvoj plejparte sufiĉas unusola termino por la supra nociaro; *de: Quantum, en: quantum, it. quánto;*

13. kuriĵo (*Curium*) cedas al la homonima zamenhofaĵo kurio, kiu en PIV havas jam kvin signifojn;

14. optimumo sekvas la pli suprajn oficialaĵojn: maksimumo kaj minimumo. Certe sufiĉas optimo, tiom pli eble, ĉar ekzistas optimumo kaj optimisto, ambaŭ sen -UM-:

15. paliumo (*pallium*) havas en PIV du tre distancajn signifojn, dum palia rilatas al budhismo. Sendube por ĉiuj tri nekonfuzablaj nocioj bone servus la logike formita: palio;

16. planumo (*Lamina orbitalis*), la plata krani-osto ŝajnas cedi el modernaj vortaroj de anatomio;

17. premio. Ĉu ne sufiĉas premio kiel termino ankaŭ por la nocio komerca?;

18. radiumo. Se la fundamenta vorto **radio** havas laŭ PIV jam 6 signifojn, kial ĝi ne havu ankaŭ tiun de la ĥemia elemento?;

19. referendumo. Ĉu pro ebla koincido kun la verbo referi plus la sufikso -END- oni imu la malpli tenian: referendo?;

20. rektumo laŭ PIV estas la lasta **rekta** parto de la dika intesto. Do temas pri rekto, termino, kiu same bone servus en anatomio, kiel en geometrio. Ja la anatomioj ĝuste akcentas tiun **geometriian** econ...;

21. serumo. Jen PIV mem referencas al: sero;

22. siumo (*Sium sisarum*) el apiacoj (PIV: umbeliferacoj) devus esti: sio. Konfuzebleco kun la refleksivo estas nula;

23. sternumo. Jen ostoj, kiu **sternas** sin meze de la homa antaŭbrusto. Do: sternoj;

24. stratumo. Ni povas kompetente aserti, ke la geologoj-esperantistoj anstataŭe uzas: tavolo;

25. taliumo, laŭ *Kalocşay* zamenhofa. Tamen, PIV prave referencas al: talio;

Memkomprene, niaj riproĉoj ne rilatas al la ĝustaj -UM-ajoj, ekz. kurkumo, samumo kaj strumo. Okaze de "Kartumo", oni povas bedaŭri sole la perforton de la fontlingva kaj la fundamenta fonetiko. Devus esti: Ĥartumo.

En PIVS troviĝas:

1. elektrumoj. Se tiu ĉi aloj estus nomata elektro, ĉu okazus fatala konfuzo kun la fizika energio?

2. kastrumo. Se la antikvaj Romanoj defendis siajn *castra*, ili ne timis konfuzon kun la verbo *castrare*. Post la du mil jaroj, esperantistoj timas...

3. opidumo. Jen terminologia maniero, ĉar opido funkcias perfekte, sen danĝero de ajna koincido.

En EB:

1. ledumo (*Ledum palustre*). Sendube, la bela torfoplanto el erikacoj devus porti la nomon: ledo, sentime pri konfuzo kun la ŝumaterialo. Cetere, la plantfolioj estas ledecaj;

2. traŭtoniumo, muzika instrumento. Nepre: traŭtonio.

Resume: En la leksiko de Esperanto jam ekzistas sennombraj fakvortoj de la helenlatina origino, kies neŭtran finajon oni ne inkludis en iliajn radikojn. Ni povus komenci laŭalfabete per la zamenhafa abrotano (*abrotanum*) kaj fini per la same zamenhafa zirkonio (*Zirconium*). Ĉu estas planlingveca procedo, apliki okaze de trideko da terminoj tiun radikfinan -UM- sole pro homonimfobio?

Precipe la ĥemiistoj, kiuj dezirus fariĝi adeptoj de l' esperantismo, konsterniĝus: Dum la latinaj elementonomoj senescepte portas la neŭtran finajon, kiu malaperas fleksie (ekz. *Bor-ium*, sed *acidum bor-icum*, do la radiko estas *bor-*), en Esperanto aperas eble kvin nomoj kun -UM-. Oni prave demandos, kial estas allasata ekz. germanio, kvankam homonima kun la landnomo, sed preskribata heliumo, kvankam okaze de helio ne minacus homonimeco.

Simila situacio estas en botaniko kaj zoologio, kiuj per siaj nomenklaturetoj celas laŭeblan ordon, tiom pli dezirindan en versioj planlingvaj.

Fontoj

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). - Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris*.

Esperanta Medicina Terminaro (1979). *J.Hradil*. - Universala Medicina Esperanto-Asocio.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987). - Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris*.

Esperanta Bildvortaro (1988). *R. Eichholz*. - Esperanto-Press, *Bailieboro*.

Inversa Vortaro de Esperanto (1989). *B. Pabst*. - Esperanto-Centro, Paderborno. Kemia kaj Scienc-teknika Vortaro (1993). *D. Portmann* - *D. Rogers*, *Naperville*.

Kurusu Kei 85-jara

Nur per kelke da vortoj ni rememoru rondan vivjubileon de la fervora esperantisto, bohemisto kaj granda amiko de nia lando - Kurusu Kei el Tokio.

La artikolojn pri lia vivo kaj laboro ni povas trovi en Startoj 2/89 kaj 2/92 (kiam li iĝis Honora Membro de UEA). Ni nur aldonu, ke nun venkis lia eseo *Kiel Esperanto helpis al mi solvi enigmojn de „Riporto“* en la ĉijara literatura konkurso de UEA. En ĝi li malvualas multajn misterojn pri persono de Julius Fučík kaj ties problema verko. Sur lia tablo kuŝas jam preparita por eldono nova japanlingva traduko de nekripligita teksto de Riporto kun multaj klarigas aldonoj.

Samtempe li preparas por presejo la duvoluman verkegon „Mi akuzas“ el j. 1946 pri prizonuloj en Pankrác. Por la pluaj verkoj de „ĉeĥa temaro“ li fervore studas historion de kontraŭgermana kaj kontraŭkomunisma rezistado en nia lando.

Espereble ni povos vidi lin persone dum la venontjara UK en Prago.

Jaroslav Žák

La idoligo de la senescepteco

Helmut Welger

Kritikaj rimarkoj pri la doktrino de la „Analiza Skolo“

La Fundamento ne estas aksiomaro, sed leĝo

La Analiza Skolo postulas senesceptan ĝeneralecon por ĉiuj reguloj. Ĝia idealo estas, ke Esperanto baziĝu kvazaŭ sur aksiomaro - aro da naturaj normoj, kiuj pro logikaj kialoj nepre devas esti ĝeneralaj, senkontraŭdiraj kaj kompletaj, ĉar alie ili tute ne povas ekzisti. Ekzemple la matematika aksiomaro ne toleras esceptoregulojn. Sed Zamenhof prave diris: „Lingvo ne estas matematiko.“ La Fundamento ne estas aksiomaro, sed leĝo - aro da sociaj normoj, kiuj baziĝas sur komuna interkonsento. Tiaj normoj ne estas tute senkontraŭdiraj, nek logike kompletaj, tamen kontraŭdiro inter leĝaj normoj ne nepre estas logika: plej ofte temas pri t.n. normkolizio.

Normkolizioj estas solvataj per jenaj du metodoj: Se unu el la koliziantaj normoj estas pli altranga ol la alia, ĝi nuligas la malpli altrangan. Se ambaŭ normoj estas samrangaj, tiam la pli speciala normo (esceptoregulo) sur sia tereno forigas la pli ĝeneralan normon aŭ donas esceptan permeson.

La leĝecon de Fundamento konfirmis Zamenhof en Antaŭparolo: *Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto:* 1) *La 16-regula gramatiko;*

2) *la Universala Vortaro;* 3) *la Ekzercaro.* Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj deloj li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardos tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto.

Kaj la tuta esperantistaro oficialigis tion per Bulonja Deklaracio (§ 4.3): *La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto“, en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon.*

Kiel konate, la esperantistaro akceptis la Fundamenton kune kun ĝia Antaŭparolo la 9-an de aŭgusto 1905. Ekde tiam ĝi fariĝis leĝo.

La Analiza Skolo rajtas kritiki la normajn bazojn de Esperanto, sed ne rajtas ilin ŝanĝi.

Kiaj „eraroj“ povas troviĝi en la Fundamento?

La rekte lingvonormigaj partoj de la Fundamento (Gramatiko, Ekzercaro, Universala Vortaro, Aldonoj) laŭdifine enhavas neniujn erarojn koncerne Esperanton, ĉar ili mem estas la netuŝebla kriterio de lingva ĝusteco en Esperanto. Estas vero, ke laŭ la Antaŭparolo la Fundamento povas enhavi „erarojn“. Sed oni devas precize legi la konceman tekston, por ekkoni, ke temas pri aliaj specoj de eraroj: Zamenhof tie parolas

pri **preseraroj** kaj pri el Esperanto erare tradukitaj **nacilingvaj vortoj**. Memkompreneble preseraroj ne povas esti netuŝeblaj, ĉar ĉe ili ja ne temas pri la vera teksto de la Fundamento; kaj por eraraj, nelertaj aŭ nebonaj **nacilingvaj esprimoj** ekzistas **eksterfundamentaj kriterioj de ĝusteco kaj erareco**, ĉar la Fundamento ja nenion povas preskribi al la lingvoj angla, franca, germana, rusa kaj pola. Nur koncerne Esperanton la **Fundamento estas senerara**.

Atente legu la norman tekston de la Antaŭparolo: *Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj repesitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj. Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la „Universala Vortaro“. Mi permesis al mi korekti nur la preserarojn; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj. La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto; sed senkompare pli grandan danĝeron prezentus la ŝanĝado de la traduko de ia vorto, ĉar, perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian ekster-*

ordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, kaj trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon. Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos trankvile: jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon.

Fakte en la Fundamento, spite al la opinio de multaj esperantistoj, troviĝas malmultaj esceptoreguloj, precipe en la Ekzercaro, sed ne nur tie: la formo „unuĵ“, la uzado de „kiel-tiel“ en la senco de „kiugrade-tiugrade“, la oficiala permeso de senfinaĵaj kaj eĉ senapostrofaĵ nomformoj kiel „Vaŝington“, permeso de duoblaj konsonantoj en „Anno“ aŭ „Ŝillero“ por eviti homonimecon aŭ almenaŭ parte konservi internacie konatan nomformon, la permeso anstataŭigi la substantivan finaĵon per apostrofo.

La Analiza Skolo, por akordigi tiujn esceptoregulojn kun la postulo de nepra senescepteco, promocias la Fundamentan Gramatikon kaj la Universalan Vortaron al „baza kodo“ (= sola fonto de aksiomoj) kaj degradas la Ekzercaron al „nura apliko“ de la „baza kodo“. Kaj ĉar aksiomeca „baza kodo“ ne toleras esceptojn, la Skolo rigardas ĉiujn Ekzercarajn esceptojn al la reguloj de la „baza kodo“ kiel „mallogikaĵojn“, do „erarojn“ forigendajn. Iugrade por ĝi la „logiko“ rolas sendepende de la „baza kodo“ kiel

memstara normfonto. Kaze de kolizio kun reguloj bazitaj laŭdire rekte kaj sole sur „la logiko“, ĝi provas deklari „erara“ aŭ almenaŭ forigenda la „malpli logikan“ regulon.

Ĉio ĉi estas malakceptebla, ĉar la opinio, ke estas norma hierarkio inter la partoj de la Fundamento, havas nenian norman bazon. Male, la Antaŭparolo de la Fundamento tute **sendistinge** deklaras ilin leĝoj. Do ili estas tute **samrangaj**. La Ekzercaro ne estas nur „apliko“, ĉar ĝia jura valideco ne dependas de la konformeco kun la Fundamenta Gramatiko, sed baziĝas senpere kaj egalrajte sur la Bulonja Deklaracio.

Plie, la logiko koncernas nur la formalan ĝustecon de la pensado, sed ĝi ne povas garantii ties enhavan veron aŭ norman validecon. Ankaŭ formallogike tute ĝusta konkludado el malveraj premisoj liveras malveran rezulton. Do, antaŭ ĉio la Skolo devus kritike pripensi siajn proprajn normajn premisojn, sed ĝuste tion ĝi ne faras, ĉar ĝi hipnotigas sin mem per la prestiĝa nocio „logiko“.

La logiko ne memstare povas generi sociajn normojn. La metodo de la Skolo estas „logiko“ ne en strikta, sed nur en ĉiutaga nepreciza senco; prefere oni nomu ĝin „lingvonorma rezonado surbaze de certa normsistemo“. Tia rezonado estas akceptebla nur, se ĝi baziĝus sur la valida normsistemo de Esperanto.

La logiko de la Analiza Skolo

Multaj eldiroj de la Skolo sugestas, ke ĝi uzas la logikon kiel memstaran norm-

fonton. Laŭ Rikardo Ŝulco (1985) la „Kvinlingva Gramatiko vere permesas per apliko de la logiko determini la tutan lingvon ĝis la plej lastaj detaloj.“ Alivorte: la „baza kodo“ rolas kiel norma premisaro. Sed ĝi ne sufiĉas: nur se la Gramatiko estus kompleta aksiomosistemo, ĝi liverus ĉiujn bezonatajn premisojn. Ni jam konstatis, ke tia ĝi ne estas. Ankaŭ la Analiza Skolo ne povas ignori, ke la baza kodo - eĉ se ĝi havus aksioman karakteron - en la dirita senco ne estus kompleta.

Do la Skolo bezonas kompletigajn normfontojn. Kiel tiaj servas:

- nesistemaj lingvoplanadaj konsideroj
- etimologiaj konjektoj (Ŝulco 1987)
- la „logika instinkto“ (Ŝulco 1987)
- la reguloj kaj modeloj de la Ekzercaro, sub la kondiĉo, ke ili ne kontraŭas la „bazan kodon“ (Do la Ekzercaro rolas ĉi tie kiel leĝo de malpli alta rango; ni jam klarigis, ke tio estas erara, ĉar ĝi estas samranga)
- krome la aŭtoritatan, kvazaŭ-norman karakteron havas ankaŭ la verkaro de Ludoviko Mimoo

Oni povas dubi, ĉu la Skolo plene konscias, ke ĝi enkondukis normojn, surbaze de kiuj eblas facile dedukti aŭ malkovri novajn regulojn. Kaj ĉiu nova regulo povas kolizii kun jam ekzistantaj elementoj de la Ekzercaro aŭ de la tradicia lingvouzo. Per tio la Skolo povas daŭre trovi novajn forigendajn „erarojn“. La rezulto de la konstanta malkovrado de novaj reguloj kaj forigado de „eraroj“ estas propra varianto aŭ dialekto de Esperanto, kiun oni povus nomi

„Regula Esperanto“. Ĝian aspekton determinas ne la „logiko“, sed la kaŝe enkondukitaj normaj premisoj.

La Skolo provas akceptigi sian dialekton helpe de la prestiĝo de la nocio „logiko“, kiu servas kiel Troja ĉevalo por kontrabandi la diritajn normfontojn. Profesoro Ŝulco kredas kaj kredigas al aliaj per sia emocia, retorike lerta stilo, ke jam en la nura LOGIKO - „la unika, universala, al ĉiuj homoj komuna logiko, kiu estas tiu de la scienco“ (Ŝulco 1985) - la Skolo posedas la universalan solvorimedon por ĉiuj lingvaj problemoj. Tiu kredo ofte sorbigas liajn eldirojn per certa morala patoso. Tial li emas en la nomo de la neerarpovala logiko kategorie korekti eĉ la Fundamenton.

La principoj de lingvoplanado

Planlingvo estas internacia lingvo konstruita racie kaj celkonforme laŭ bazaj principoj, kiel ekzemple: unueco, stabileco, klareco, facila komprenebleco, esprimada oportuneo, facila lernebleco, simpleco, reguleco, fleksebleco, viveco, beleco, mallongeco ktp. La principoj parte koincidas, parte kontraŭas unu la alian. Kiam unu el du konfliktantaj principoj estas perfekte plenumita, suferas la alia. La solvo povas esti ĉiam nur optimuma kompromiso. Absoluta perfekteco estas neatingebla, ja eĉ nedezirinda.

Resume ni povas diri:

- En Esperanto ne absoluta senescepteco, sed kiel eble plej granda taŭgeco kiel internacia lingvo estas la plej grava principo
- La Fundamento ne estas aksiomaro,

sed leĝo

- Ĉiuj tri partoj de la Fundamento estas samrangaj
- Kaze de normkolizioj interne de la Fundamento temas ne pri logikaj kontraŭdiroj aŭ eraroj, sed pri escepto-reguloj
- La Fundamento povas enhavi preserarojn, sed ne lingvajn erarojn

Literaturo

- MIMOO, L:** Kompleta lernolibro de Regula Esperanto, Esperanto-Centro Paderborno 1989
- ŜULCO, R:** Pledo por unueca lingvo, Esperanto-Centro Paderborno 1985
- ŜULCO, R:** Noto pri la scienceco de la internacia lingvo, 1985
- ŜULCO, R:** Notoj pri la aksiomado de la internacia lingvo, 1985
- ŜULCO, R:** Sur la vojoj de la Analiza Skolo, Esperanto-Centro Paderborno 1987
- ŜULCO, R:** La Analiza Skolo antaŭ la Maloveca tribunalo, E-Centro Paderborno 1991
- ŜULCO, R:** La esenco de la Analiza Skolo, Esperanto-Centro Paderborno 1991
- WELGER, H:** Pri la dezirendaj neperfektaĵoj de planlingvo, Naturista Vivo 1981
- WELGER, H:** Kontribuoj al la norma esperantologio, Marburg, Info-Servo 1994
- WELGER, H:** Die Analiza Skolo und die Logik, Marburg, Info-Servo 1994
- ZAMENHOF, L:** Fundamento de Esperanto

Karolo Piĉ
La Litomiŝla Tombejo
DOKSO

Julie vi iras Doksen. Al la Somera Esperanto-Kolegio. Dokso estas eta urbeto, havanta eĉ ne kvar mil loĝantojn. Germane ĝi nomiĝis Hirsbergo kaj ĝi estis pli malpli nekonata. Postmilite, subite, ĝi iĝis furora somera restadejo.

Doksen kunveturas tricent esperantistoj. Preskaŭ en ĉiu domo loĝas iu. Ne ekzistas fenestro, en kiu ne estus verda flago. Dimanĉe posttagmeze oni kolektiĝas antaŭ la urbodomo. La urbestro alparolas ĉiujn el balkono. Li salutas kaj bonvenigas la Kolegion kaj deklaras ĝin malfermita. Sekvas paroloj de la funkciuloj. Sonas muziko kaj En la mondon venis nova sento, Tra la mondo iras forta voko, Per flugiloj de facila vento Nun de loko flugu ĝi al loko. La verda flago iras sur maston. Ĝi flirtos tie senpaŭze dum du semajnoj. Dum du semajnoj ĝi regos la deklivan, kvadratan Doksan placeton. El la kontraŭa angulo ĝin rigardos alia flago. Ĝi pendos sur la lernejo, kiu estas la sidejo de la Kolegio.

Kaj lunde... Lunde vi metas vin en benkon de la seminario. Historio de la internacilingva ideo. La unuaj projektoj. Volapiko. Historio de Esperanto. La esperanta literaturo. Profesoroj alternas. Lekcio sekvas lecion. Oni prelegas elklude nur esperante. Vi aŭskultas. Vi komprenas ĉiun vorton. Kaj vi spertas ion neforgeseblan. La klaso de la malgranda Doksa lernejo estas kvazaŭ aŭlo de la mezepoka Sorbono aŭ de iu

alia glora malnova Universitato mezepoka, de la Bolonja, Salamanka aŭ de la Praga Karola ekzemple.

En la kvindekaj jaroj la Doksaj Kolegioj fariĝos iaj miniaturaj lokaj Universalaj Kongresoj. Ilia seminario estos Internacia Somera Universitato. Kaj en ilia kadro funkcios ankaŭ aliaj kongesaj aranĝoj. Ekskursoj, mesoj, belartaj konkursoj. Ĉiutage aperados ciklostilita, minimume dufolia grandformata Verda Voĉo de Dokso (dumjare, inter la unuopaj Kolegioj, ĝi aperados monate), kiu sur siaj paĝoj, en la daŭro de la tempo, sub elstararedaktado de Antonio Slanina arigos ne nur bonhumoron kaj spriton, sed ankaŭ gravajn originalajn kunlaboraĵojn poeziajn, beletrajn, eseajn kaj aliajn, kaj precipe ak ĉiujn premiitajn verkojn de la ĉiujaraj Floraj Ludoj de Dokso. Sed en Dokso okazos ankaŭ pluraj teatreprezentadoj de la Verda Ĉaro de Julio Baghy, fondita far Eva Seemannová. Kaj en la Kolegia kadro oni aranĝados ak glorajn koncertojn kaj furorajn vesperojn de eklezia muziko preĝeja.

La malnova Doksa kirketo estas plenplena. La orgeno muĝas. Kaj dos la altaro vin rigardas aĝa, nedireble milda, preskaŭ miljara nigra Maŭra Madono, veninta tien tra la hispana Montserato. Siatempe ŝi troviĝis en la gotika kapelo de Bezdezo. Kiam la reĝa burgo Bezdezo iĝis ruino kaj dezertiĝis, ŝi transiris en la preĝejon de Dokso. Vi amas ŝin. Ankoraŭ unufoje vin revidi, belega, nigra Madono!

Sed la Kolegio, tio estas interalie ankaŭ la urbo mem, la kastelo, Maĥa

lago, la arbaroj kaj la majesta ruino de Bezdezo, altanta sur abrupta hilo meze de arbaroj. Kaj la Kolegio, tio estas ak bunta societa vivo, interkonaj vesperoj, paroladoj, prelegoj, diskutoj, gloraj baloj kaj ĉarmaj kolegianinoj.

Henrieta ... Alia ol la Valdštejna ...
Libuša ... Alia ol la Polička ...

Vi estas en malhela ĉambro. Sub la fenestroj grizas kruta strato, irana al la preĝejo kaj al la urba placo. El la strato sonas bruado de aŭtoj kaj motocikloj... Kaj en la ĉambro helas bruna, plensvelta, elasta korpo ... Libuša ... Juna sinjorino ... Belegaj formoj kaj ovaloj ... Vi ploros, kiam post du delektaj semajnoj oni solene fermos la Kolegion kaj malhisos la flagon. Ĉiuj ploros ... Ĉar la Doksaj semajnduopoj ĉiam estis kvazaŭ riveloj kaj miraklo. En la sufokaj tenebroj de la kvindekaj jaroj ili estis eta Paradizo, io ekster la tempo kaj spaco, perlo elportita el abismo, sunoza insulo savita el diluvo...

La eta Dokso, ekstersezzone morta kaj dezerta, dumsezzone svarma kaj bolanta, dum tiuj du semajnoj iĝadis ankoraŭ pli febra kaj ardanta. Steludaj flagoj verdis super la urbo. Esperanto sonis sur plaĝoj kaj stratoj, en magazenoj kaj aŭloj, ĉie. Kaj ... Jes, la Kolegioj estis etaj Universalaj Kongresoj. Dokso estis Esperantujo ... Fekunda grundo.

El tiu grundo elfloris Verda Somero, via alia poemkolekto. Ĝi ne intencis esti profundpoezia kaj altbrova. Ĝi volis esti nur gaja kaj sunplena kiel la Doksa plaĝo, kaj ĝoja kaj lula kiel etaj ondetoj de la romantika Maha lago. Noktiĝas. Sur la lago glitas barko. Akvo plaŭdas.

En la barko sidas Libuša kaj vi. Libuša havas blar kan veston kaj nenion sube. Kaj en la krepusko vi ne plu distingas, kio estas la tolo kaj kio karno kaj korpo, kio nigra ombro kaj kio la nigro de la sino ... La Maha lago estas Piemonto. Kaj Libuša estas dukino Sanseverina ... Buoj tintas ... Akvo plaŭdas... Aŭ... Ĉu tio estas la sekretaj kisoj de Libuša-Sanseverina...?

Sed ... Por la Kolegio vi verkis ak aron da studoj kaj prelegoj. Esperantaj neologismoj. La supersignitaj literoj en Esperanto. Kaj grandan, kelkcentpaĝan manuskripton Lingvo Vivanta.

La Kolegio reprezentis unu epokon. pro tio, multajn jarojn pli poste, en Specialaj Kazoj de la Instruado de Esperanto, referaĵo destinita por la Novjorka Sesio de la usona Modern Language Association, vi povos skribi:

Unikan nivelon, siatempe, havis la ĉeĥa Somera Esperanto-Kolegio en Dokso. Tian nivelon neniam atingis ekzemple la Somera Esperanto-Tendaro en Lanĉovo. Ĉe tio elludis rolon multaj cirkonstancoj: romantika loko, kultura medio, perfekta organizo, unuaranga gvidantaro, neforgesebla etoso, libera pensinterŝanĝo. Plie, en la Doksa Kolegio prelegis aro da elstaraj lektoroj, inter ili pluraj profesoroj, Lingvaj Komitatoj, Akademianoj, poetoj, verkistoj, vojaĝistoj, redaktoroj: Pitlik, Slanina, Ŝolc, Ŝpur, Hanuš, Vítek, Kamaryt, Ginz, Hromada, Pumpr, Kořinek, Mařík, Kožený, Černý kaj aliaj. Multaj el ili apartenis ankoraŭ al la intermilita elito. Bedaŭrinde tiu brila Plejado, el kies vicoj dume plurajn plukis la Granda

Falĉisto, ne plu trovis same multajn postirantojn. Nur la Doksa Kolegio, intertempe droninta en la mornaj tajdoj de politikaj diskriminoj, iom post iom iĝis mito kaj legendo: ĝis nun ne superita kaj apenaŭ superebla ...

Jes, la Kolegio malaperos. Ĝi ĉesos ekzisti. Ĝi dronos en flusoj kaj ŝtormoj de la tempo. Io tamen ne mortos. La sulko, kiun ĝi kavigis. La instigoj, kiujn ĝi ponis kaj dissemis. Kaj la rememoroj, kiujn ĝi kreis kaj inspiris.

Glosoj

ak - ankaŭ

dos - de sur

poni - meti, stariĝi

-ud- sufikso signifanta *abunde -hava, kun granda -o:* mamuda, ventruda

Karolo Piĉ

Fremdaj landoj

Por knab' la Fremda Lando estas la salono, en kiu bonodoras la patrinparfum', en kiu lin rigardas milde la plafono, kaj kie sin vespere sternas la mallum'.

La aĵoj lin katenas tie per mil ĉarmoj; kaj sian ĉarmon havas tie ĉiu aĵ'; el ĉio elradias tie strangaj varmoj; novaĵojn trovas li dum ĉiu sia paŝ'.

Ĉar ĉie lasis ja la vivo siajn signojn, sur ĉiu aĵ' ja kuŝas ia homa tuŝ'; la seĝoj, planko, mebloj havas siajn dignojn kaj pro ĉi ĉio mutas la knabeta buŝ'.

El siaj oraj kadroj lin rigardas avoj, surtable ruĝas rozoj en kristala vaz', la ŝrankoj ĝemas malsur dikaj polvolafoj kaj sub la reĉiama griza tempopas'.

Kaj mem la grizo tie ardas kiel flamo, kaj iel nekutima estas ĝia ton'; ĝi jen briletas kiel ĵus naskita amo, jen dronas ĝi en sia griza monoton'.

Kaj tiam li ekvolas novajn Fremdajn Landojn; la ekkonitaj lin ne tedas ja ĝis nun; sed kial li ne serĉu tute novajn grandojn...? Li legas do en sia Bildalfabetum'... :

„La koro estas ruĝa, kaj la koro batas.“

„La koro scias ami. Ĉu vi havas ĝin?“

„Diversaj aĵoj tiun varman koron flatas.“

„La koro ofte emas revii pri fein'...“

La lampo lumas kaj la knabo ĉiam legas, de unu fraz' li kuras al alia fraz'; ilian fajran sencnon li duontrovegas sub la multvorta ŝelo kaj la vorta gaz'.

Kaj ĉiu frazo estas kvazaŭ sava ponto kaj kvazaŭ ebriga gut' de akra brand'; trans ĝi malfermas sin la nova horizonto... La knab' ekstaras ĉe la soj' de l' Fremda Land'...

(fragmento)

* * *

Printempa invito

Ne ploru, amatino;
la frostoj iris for
kaj majprintempa vino
ekbolas en amfor'...

Ne ploru, jen burĝonoj,
vespero kaj arom',
jen birdkantetaj tonoj
kaj ĝoj' en ĉiu dom'...

Ne ploru, iru kun mi,
ni sidos en la park'
kaj vidos Lunon lumi
kaj tremos kiel bark'.

Karolo Piĉ

Esperantaj neologismoj

En Julio 1949 la 29-jara Karolo Piĉ prezentis en la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy prelegon kontraŭ neologisma manio (oktobre la prelego aperis en la gazeto Esperantista), sed post kelkaj jaroj li mem fariĝis la ĉefa neologismemulo de la movado. Unue ni tralegu la finon de la longa prelego.

Pluaj perspektivoj

Konklude oni povas nur ripeti, ke la neologisma problemo ne estas ia izolata trajto de la Lingvo Internacia, trovanta analogion nenie aliloke, sed male komuna malsano, kiun simile konas ankaŭ aliaj lingvoj kaj langaĵoj.

Se ni, malgraŭ ĉio, volus precize difini la infekton, ni ne dirus „malsano“, sed eĉ „infanmalsano“. Ĉar nur tro junaj lingvoj kaj idiomoj travivas tiun ĉi kritzeton.

Ĉiu lingvo posedas sian neologisman periodon. Ĝi trafas la lingvon en tiu momento, en kiu ĝi estas forlasanta sian elementan estadon kaj iom post iom fariĝanta kulturlingvo. Kaj precize tiu ponto, tiu nerimarkebla transiro de la malalta ekzistado al la pli alta, definitiva kaj intensa estas karakterizata per la enkondukado de novaj, pli freŝaj kaj elegantaj vortoj kaj terminoj.

Tamen tiu transira stadio ne povas daŭri ĉiam. Pli aŭ malpli frue ĝi finiĝos, kaj la firmamento sereniĝos. En la kultura periodo de la lingvo, en tiu ĝia pe-

riodo, en kiu la lingvo ĉesos esti infano kaj fariĝos viro, ne plu ekzistos neologisma problemo. Ĉar tiam subite oni ne plu ŝatos la neologismojn, trovante *malnova* pli bona, pli eleganta kaj, paradokse, eĉ pli mallonga ol *olda*, kaj ĝenerale oni komencos estimi *printempo* pli multe ol *primavero*.

Tiu ĉi evoluon Esperanto jam parte trairis, kvankam la nivelo ankoraŭ ne tute trankviliĝis. Kaj ankaŭ tie ĉi la historio mirinde ripetiga. Ĉar ion similan longtempe antaŭ Esperanto travivis la franca lingvo, kaj se ni ne volas tuŝi historion tiom malproksiman, antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj la ĉeĥa lingvo, en kiu tiam, simile kiel antaŭ kelkaj jaroj en Esperanto, furiozis sama vortenkonduka kaj vortokrea febro, kiu antaŭ nelonge skuis la lingvon Zamenhofan.

Se ni nun legas la tiutempan literaturon kaj poezion, en kiuj ope svarmas neologismoj kiel *zkad*, *kýs*, *mlno* kaj aliaj, ni ne povas deteni nin de miro, ĉar multaj el tiuj neologismoj estas nun ridindegaj kaj studanto de la ĉeĥa literaturo ankoraŭ ĉi tiam primokas ilin. La ceteraj, kiuj ne aspektas tro ridinde, dume tiom malnoviĝis, ke nur malmultaj lingvoposedantoj povas nun rekoni iliajn originajn sencon kaj signifon.

Krome ankoraŭ aliaj analogioj sin altrudas. La ĉeĥan neologisman periodon la literatura historio baptis „*parnasismo*“. La plej kompleta neologisma kolekto esperanta titoliĝas *Parnasa Gvidlibro*.

Sed eĉ ĉi tie la similaĵoj ne finiĝas. La esperanta *parnasismo* havas sian Kalocsay. La ĉeĥa *parnasismo* havis sian Vrchlický. Tiu ĉi, same kiel Kalocsay,

estis spirito klera, multflanka, lingvo-sperta, sprita kaj literature tre fekunda. Li postlasis verkaron, al kiu nur malfacile oni povus kompari verkaron de iu ajn aŭtoro alia. Li estis tradukanto de hispana, franca, germana, itala kaj aliaj poezioj. Li tradukis ĉehlingven Inferon de Dante, konservinte la originalan formon kaj rimadon. Tamen nuntempe liajn verkojn preskaŭ neniu plu tralegas. Ĉar ilia parnasisma pralingvaĵo impresas iom eksmode, malnovece kaj mucide.

Ĉi tie la analogioj estingiĝas. Tamen la perspektivoj restas klaraj kaj videblaj.

Ĉefneologismemulo Kalocsay ne eraru! Tio, kion li propagandas kaj kion li kredas progreso, estas fakte nur infana malsano. Tamen ĝi estas neevitebla kaj necesa. Ankaŭ knabino devas malsani por fariĝi virino. Ĝi estas lingva maturiĝado. Spasmo de idiomo, kiu iĝas Lingvo! Ni konas tion! Antaŭ cent jaroj la ĉeĥa lingvo malsanis same! Sed la malsanoj foriĝos. Kaj oni trovos ne nur ke ekzemple *preskaŭ* estas pli bela ol *presk*, sed eĉ, paradokse, ke ĝi estas pli mallonga ol *presk*.

Post Vrchlický venis Čapek. Kaj post Kalocsay eble iam venos iu, kiu trovos, ke la plej poezia lingvo estas prozo la plej prozega.

Tamen se ne estus veninta Kalocsay (kies genio estas granda kaj nepre nediskutebla), iam en la Estonteco eĉ ne povus veni la atendata Nekonata Venonto.

La neologismaj ekscesoĵoj verŝajne neniel malutilos al la lingvo. Oni povas supozi, ke ankaŭ Esperanto trauros la

tempon de sia puberiĝado same sen-domaĝe kiel ĝin trairis la aliaj lingvoj vivantaj.

Male oni povas eĉ atendi, ke ekde tiu momento, en kiu la lingvo definitive kaj plene maturiĝos, la nuntempa emo al neologismoj ne nur tute ĉesos ekzisti, sed eĉ ke tiam estiĝos alia emo, inklinanta al la uzado de la malnovaj, oficialaj vortoj esperantaj, emo tute kontraŭa al la emo neologisma.

Oni povas atendi, ke la malnova vortprovizo esperanta tiam plene familiariĝos, akirante tian elvokan forton, pri kiu oni ĝis nun eĉ ne povis revii.

La mirinda vivanteco de la Lingvo trauros eĉ ĉi tiun cetere naturan kaj normalan krizon.

Esperanto estas jam neniigebla. Ju pli multe da tempestoj bruegos super ĝi, ju pli skuaj kaj fortegaj krizoj ĝin agitos, des pli juna kaj forta ĝi sin prezentos morgaŭ.

Ĉar ĝi estas kiel Fenikso.

Morgaŭ ĝi releviĝos el cindro de ĉiuj siaj neutilaj, netaŭgaj kaj vanaj neologismoj hodiaŭaj pli bela, pli eleganta kaj pli fortika ol ĝi estis hieraŭ, antaŭ-hieraŭ kaj antaŭ sesdek jaroj.

La romano kaj ĝiaj lingvaj problemoj

Karolo Piĉ tute ŝanĝi sian opinion, kiam li mem komencis verki romanojn. En postparolo al La Litomiŝla Tombejo li esprimis malesperon de verkisto, kiu sentas nesufiĉon de la Fundamenta lingvaĵo en Esperanto por beletra verkado. Jen kelkaj fragmentoj el la postparolo:

Oni povas aŭdi ripetigantajn plendojn koncene la kvaliton kaj nivelon de la originala prozo esperanta. Tiuj plendoj estas jen pravaj, jen malpravaj. Ĉiukaze pri la nivelo de la esperanta novelistiko decidis aro da faktoroj, kiuj ne havas la samajn radikojn.

La problemoj de la prozo enkludas du grandajn demandokompleksojn, la literaturan-artisman, kaj la lingvistikan-lingvan. Ambaŭ kompleksoj interne tre proksime koneksas kaj intertuŝiĝas. Kaj ili profunde influas unu la alian. Ĉi tie tamen nin interesos ĉefe la *lingvistika* flanko de la problemaro.

Antaŭ ĉio, alte ellaborita, artisma prozo estas neebla sen alte ellaborita, artisma, riĉa kaj ĉiel esprimiva, nuanc-ozta lingvo.

Esperanto havas respektindan poezion. Tio estas fakto, pri kiu oni ne plu diskutas. Sed respektindan poezion povas elkrei eĉ idiomo relative senviva kaj rigida.

La poezio estis io eksterordinara kaj dimanĉa. Tiu dimanĉa poezio havis sian dimanĉan, parnasan vortostokon. Kaj ĉio iris glate kaj senĝene. Dum pluraj jaroj oni vartis la versistikon kaj neglektadis la prozistikon. Oni iel forgesis, ke la vivo ne konsistas nur el dimanĉoj. La ordinara semajno de ĉiu ordinara romano havas ja ankaŭ blujajn lundojn, blankajn mardojn, aĉajn merkredojn, verdajn ĵaŭdojn, nigrajn vendredojn kaj senagajn sabatojn. Kaj ankaŭ ĉiuj ĉi bezonas siajn specialajn kaj adekvatajn fakvortarojn kaj esprimojn, tiel ke sen moderna Esperanto ne estas moderna prozo.

Al Esperanto, antaŭ ĉio, mankas pro-

fanaj, ĉiutagaj konversaciaj parol-elementoj, stilo kaj vortaro. La mizera nivelo de la esperantaj konversacioj estas, cetere, notore konata. Tamen sen taŭgaj, trafaj kaj sukaj terminoj, sen kurtaj kaj koncizaj parolturnoj, sen abundaj kliŝoj kaj diversaj mallongaj vortetoj ne eblas vivaj babiloj. Kvankam - oni ne miksu du malsamajn aferojn ĉi tie. Io alia estas konversacio pri novismoj. Kaj io alia disputo inter ebria edzo, ĵus alrampinta hejmen kvarkrure, kaj inter lia furioza edzino, kiu lin vane atendis ĝis la dua nokte. Mi konfesas, ke mi kapablus dum dek horoj, senpaŭze, prediki pri novismoj. Mi konfesas, ke eĉ dum kvin minutoj mi ne kapablus kontinue ŝpini ebriulan disputon. Simple tial, ĉar jam post tri, kvar frazoj venus fino al mia latino. Pardonu! Mi venus al la rando de mia Esperanto.

Kaj mi certe ne troigas asertante, ke per la hodiaŭa Esperanto oni ne povas **adekvate** kaj **artisme** traduki eĉ unu solan romanon aŭ novelon ĉeĥan. De tempo al tempo aperas ja onidiroj, ke iu aŭ aliu ĵus genie translatis Ŝvejkon. Tiujn sciigojn mi resendas al la regno de fabeloj! Mi kredus ilin, se skribiĝus 2138. Mi ne kredas ilin en 1983!

Ŝajnas do pli kaj pli necese eviti samtempe la senutilajn neologismojn kaj la tro pezajn kaj arkaikajn vortokonstruaĵojn. Sed estas urĝe ankaŭ, en la kadro de la sistemo, fari nian lingvon pli riĉa, pli kompleta, t.e. pli leĝera kaj pli moderna.

Esperanto havas iom tiom disvolviĝintajn lingvaĵojn poezian, sciencajn kaj eseajn. Ĝi ne havas disvolvitan lingvaĵon

romanen. Sed la romana lingvaĵo ne povos maturiĝi sen:

- 1) precizaj terminoj por ĉiuj objektoj de la ĉirkaŭa mondo;
- 2) aro da vastsencaj terminoj laŭeble polisignifaj;
- 3) necesa sinonimigo kaj sinonimigo de la vortaro;
- 4) riĉe disvolvita sistemo afiksa;
- 5) abundo da kliŝoj kaj diversaj malgrandaj vortetoj (prepozicioj, konjunkcioj, pseŭdoadverboj, interjekcioj);
- 6) plua aglutinigo de la tuta vortaro, kiu kondukos al la konsekvenca aplikado de la dua parto de la 15-a regulo, kaj al retrodeduktado, kiu estas unu el la neeldiritaj principoj de la Ilustralo;
- 7) ĝisfunda malnaturaligo kaj raciigo de la sistemo;
- 8) kuraĝa ĉerpado el la propraj fontoj kaj provizoj;
- 9) kelkaj urĝaj pliprecizigoj kaj korektoj;
- 10) ĝenerala koncizigo, malpezigo kaj elastigo de la stilo.

La romana lingvaĵo estas multrilate paradoksa. Unuflanke ĝi bezonas laŭeble tre precizajn terminojn por ĉiuj objektoj de la ĉirkaŭa mondo, tre ofte rekte fakterminojn. Samtempe tamen ĝi ne povas ekzisti sen vortoj, kies senco estas nebula, vaga, pli malpli senkontura, duvizaĝa kaj multsignifa.

Tiel, jen, por ĝi necesas *burgo* (fortikigita kastelo), *kaŭĉo* (divanlito), *vanui* (disiĝi, foriĝi, esti malaperanta), *ostenta* (malkaŝe provoka), *demoli* (malkonstrui), *gala* (parada, solena), *hunti sin* (kurigi sin laborcele, foruzadi sin per senĉesa agado), *vabanko* (facil-

anima decido, tro fidanta al fortuno, hazardo kaj bonŝanco), *cuki* (rapide ektiri, skui), *miŝmaŝo* (senorda miksaĵo, galimatio), *ŝtrapaco* (penego, ĉia longa, laciga agado), *blinko* (intermite lumi), *haldo* (montetforma amasego), *kravalo* (disputbruego, rumoro), *hurto* (abrupte insistadi, urĝe postuli), *kiksi* (fiaski, rompiĝi, difektiĝi, forpasi) ktp.

La foresto de tiaj vortoj prezentas gravan mankon kaj sendiskutan breĉon en la beletra lingvaĵo esperanta. Ĝi estas baro, kiu daŭre bremsas la normalan disvolvigadon de la originala prozo kaj la necesan viviĝon de la konversacia parolo. Ĉar la konversacia parolo ne estas nur demando de stilo. Antaŭ ĉio ĝi estas eĉ afero de multaj ordinaraj, preskaŭ slangaj esprimoj. Ĉar konversacio, tio estas buntaj etiketoj kaj elastaj, sukaj vortoj, trafikaj kiel frapo.

Bedaŭrinde parto de la esperanta vortostoko suferas eĉ pro morbo rekte mala. Ĉiupaŝe oni renkontas terminojn, kies sencoj estas tro striktaj kaj rigidaj, kaj kies difinoj, iam, ne akordiĝas kun iliaj faktaj signifoj: *ravino* (profunda, kruta valeto en montaro aŭ arbaro; sed ja ankaŭ simila „valeto“ inter du tuŝigantaj tegmentoj, kies fundon formas metala *rino*, defluilo); *morbida* (supla kaj delikata; jen alia misdifino, ĉar morbida ja estas malsaneca, morba, dekadenca, morbema); *hopi* (salti nur per unu piedo; krome tamen saltetadi eĉ dupiede); *ferio* (libera tago; sed liturgie ankaŭ ĉiu semajntago krom sabato kaj dimanĉo); *lagro* (aksingo; tamen ja ankaŭ koncentrejo kaj ĉia alia simila arealo, barakaro; lagro signifas ja kuŝejo, kuŝujo).

Tro granda precizeco ofte ĝenas alimaniere. Tiel ne eblas nomi *enterigo* funebran ceremonion en krematorio. Simile patro, kiu ĵus punis sian malĉastan filinon per rimeno, apenaŭ povos diri, ke li ŝin vipis, skurĝis, vergis aŭ flagelis. Tial, jen, la neŭtrala *verberi*, ne aludanta pri la ilo.

La maksimuma eluzado de la ekzistantaj ebloj stilistikaj kaj vortaraj estas la ĉefa tendenco de ĉiu lingvo vivanta. En la kadro de tiu tendenco la idiomo provizas la disponeblajn vortojn per ĉiam pli kaj pli novaj sencoj kaj sencnuancoj. *Primo*, laŭ PIV, estas 1) entjero, 2) kanonika horo, 3) skermpozicio. Sed *primo*, *sekundo* ktp. ĝis *oktavo* estas ak nomoj de gimnaziaj klasoj, kaj *primanoj*, *primaninoj*, *sekundanoj*, *sekundaninoj* ktp. estas la koncertaj geklasanoj. Tamen la lingvo ne haltas eĉ ĉi tie. El *primo* ĝi derivas *prima*, al kiu ĝi surdonas, plie, ankoraŭ la kromsencan *unuakvalita*, *bonega*.

Sed la romana lingvaĵo esperanta ne povas ekzisti eĉ sen abundaj *sinonimoj*. Tiom pli ke fakte ili ne estas absolutaj sinonimoj, nam neniam ili tute egalas. *Lingvo* kaj *idiomo* ne estas precize la samo. Kaj ankaŭ *malami* kaj *hanti* ne estas precize la samo. *Malami* estas nur malo de *ami*. Tamen en *hati* estas rekte io nigra kaj rankora. Kaj tio, senŝanĝe, validas ankaŭ pri *mava* (malbona), *pita* (malgranda), *lontana* (malproksima), *nelge* (antaŭ nelonge) *malnelge* (antaŭ longe) kaj aliaj. Kio pruve montras, ke nenio povas anstataŭigi la elastan kaj unikan *mal-*. *Mal-* *-a* estas io alia ol la nura *-a*, se ne paroli pri tio, ke trompita

virino, sene, apenaŭ povus fari la delikatajn nuancigojn kaj gradigojn, kiujn ŝi faras, dirante „mi malamas, hatas, malamegas vin!“ Sen sinonimoj, same, apenaŭ eblus flatoj kiel „vi havas malgrandajn, pitajn, etajn manojn.“

Esperanto ĝis nun konis pli malpli nur *monto*, *monteto*, *valo* kaj *deklivo* tie, kie la naciaj lingvoj distingus *hilo*, *kolino*, *kumulo*, *pinto*, *glaciso*, *siero*, *kruto*, *abrupto*, *ravino*, *abismo*, *flanko*, *dorso*, *rino* ktp. Estas homoj, kiuj ne rekonas la neceson de *pita*, *mava* kaj *hati*, ekzemple. Eble ne estas homoj kredantaj, ke nur per *monto*, *valo* kaj *deklivo* ili povus fari plastikan kaj veran priskribon de pejzaĝo. *Monto*, *valo*, *deklivo* estas baza kodo. Ĝi ne estas artisma lingvaĵo. Ĝi ne estas eĉ simpla faka terminaro.

La esperanta sistemo afiksa estas perfekta. Tamen ankaŭ ĝi be estas fermita. Kaj fakte, ĉiam ĝi riĉiĝadis, eĉ se, kompreneble, multe malpli rapide ol la normala vortostoko.

La elasteco kaj esprimivo de la lingvo dependas interalie ankaŭ de sufiĉa nombro de a tiel nomataj malgrandaj vortetoj (prepozicioj, konjunkcioj, pseŭdoadverboj, interjekcioj). Zamenhof estis tre ŝparema ankaŭ sur tiu ĉi kampo. La romana praktiko devos serĉi solvon eĉ ĉi tie. Jen fragmento el romano:

„Mi telefonis al li tagmeze, *sed* mi ne trafis lin, *ĉar* li ne estis hejme, *sed* Vera diris al mi, ke li venos je la unua, *sed* kvankam li promesis tion, ŝi ne certas, ĉu li ne malfruiĝos, *ĉar* li havas gravan traktadon, *sed* ĉiukaze mi voku ŝin refoje post unu horo!“

Nu, la karakteriza trajto de ĉi tiu ero estas la plurfoja (kaj iom ĝena) ripetado de *sed*. La solaj *ĉar*, *sed*, *tamen*, pri kiuj Esperanto disponas, estas ŝoke pokaj, kaj prozisto ofte devas fari verajn kapriolojn kaj kolrompajn stilajn eskamotaĵojn, por eviti ilian oftan ripetadon, kiu ĉiam impresas komencantule kaj ĝene. Por la lingvo tio signifas, ke iuj gravaj stilnuancoj restas al ĝi fermitaj. La mankon povus forigi la alternativaj *nam*, *ma*, *aŭtem*, kiuj kun la jam ekzistantaj rimedoj estigus parencajn duopojn *ĉar - nam*, *sed - ma*, *tamen - aŭtem*.

La esperanta romano urĝe bezonas koncizan kaj elastan konversacian stilon, tiun stilon, kiu regas en normalaj interparoloj kaj hejmaj babiloj, kaj kiu diametre diferencas ab la mucida lingvaĵo, kiu ŝimas en lemolibroj.

Lemolibro povas diri „iru ĉerpi akvon“ aŭ „iru alporti vinon“. Tiel oni skribas. Tiel oni ne parolas. En la hejma babilado el la supraj ŝraŭbitaj frazoj restas simple kaj koncize nur „iru por akvo kaj „iru por vino“, en kiuj *por* elaste anstataŭigas *infinivon*, respektive la kunligon de *por* kun *infinitivo*.

Kaj simile la delikana fakton, ke „ŝi iris en koncertejon kaj li en gastejon por gluti tie kelkajn bierojn dume“ la lingvo esprimas per la frapa kaj senceremonia „ŝi riris al koncerto kaj li al biero“. La popolslanga „ŝi iris al muziko“ diras, same, ke „ŝi iris danci en dancejon“. Kaj eĉ „muziko“ ĉi tie ne reprezentas la altan muzikon, pri kiu, unuavice, interesiĝas muzikologio, sed la ordinaran, profanan konsummuzikon de baroj

kaj urborandaj amuzejoj.

Entute la viva parolo tre ŝatas ĉian figurecan, preskaŭ impresisman aplikon de la lingvo, ĝian bildan uzon. En tiuj teritorioj oni ne „trinkas tri grandajn glasetojn da alkoholo“, tie oni „glutas tri grandajn nanojn da rumo“, ĉar tie „nano“ ne estas nur „eta homo“, sed pli larĝe, figure, eĉ „eta glaseto“, ĉe kio la paradoksa ligo de „granda“ kaj „nano“ nur ankoraŭ plialtigas la esprimivon.

Ĉi tie, same, viroj ne venas hejmen „ebriaj“, sed „vaporumitaj“, eĉ tiom, ke ili apenaŭ „plikas la paŝilojn“, kaj en la bunta parolo de ludomaj galerioj oni do ne diras „li tre ebriigis sin“, sed „li bele vaporumis sin“.

Entute la sufikso *-um'* estas unu el la plej riĉaj kaj preferataj konversaciaj parolrimedoj. La babilo aplikas ĝin tre larĝe kaj diversmaniere, sed, precipe, ĝi eluzas ĝian sencon *kovri -e*: li amumis ŝin - li kovris ŝin per amo (t.e. li amuzis ŝin); li kisumis ŝin - li kovris ŝin kise; sed ankaŭ: infano desegnumis muron - ĝi kovris ĝin per desegnoj; ŝi skribumis tri grandajn leterpaĝojn - ŝi plenigis ilin skribe; li merdumis sin - li malpurigis sin merde.

La konversacia lingvo ŝatas trafajn eldirojn. Paradokse, ĝi elektas tiucele ŝajne tute neadekvatajn terminojn. Jen ŝvelintajn *striojn* kaŭzitaĵajn de vergobatoj ĝi ne nomas ŝvelaĵoj, sed jen *kolbasoj* kaj *budenoj*.

La parola lingvo estas kurioza miksaĵo de skrupula precizemo kaj de facianima, senzorga, iam preskaŭ fola leĝero. Se iu intence preteratentas, ne-

glekta ion, jen „li fajfas pri tio“, „li kraĉas pri tio“, aŭ eĉ pli suke „li merdas pri ĝi“. Analoge kun la popola saĝo kaj centjara sperto la lingvo nomas „merd-umito“ ĉiun malkuraĝulon kaj poltronon, kiu en decida horo fekas pro timego. Kaj se iu ĝenas oni, ĝi rekomendas al li, ke li „iru pugen“!

Klude oni povas do diri, ke la disvolviĝo, la faka kaj profana riĉiĝo kaj elkonstruo de la lingvo alportos, retre, novajn eblojn ne nur al la prozo, sed ankaŭ al la poezio, ĉar ĝi fekundigos entute ĉiujn kampojn, sur kiuj la idiomo aplikigas.

Ni funebras

Post longa malsano mortis la 29-an de aŭgusto 1995 inĝ. **Jaromír Řebíček**, longjara kaj sperta esperantisto, honora membro de ĈEA, membro de UEA, honora membro de IFEF kaj honora membro de la komitato de E-rondeto Havlíčkův Brod.

Li forpasis en la aĝo de 87 jaroj. Dum sia poresperanta agado li elstaris precipe je la kampo de fervojista terminologio - li helpis kompili fervojistan Esperanto-vortaron. En lia persono perdas nia E-rondeto eminentan instruiston, ofereman organizanton kaj honestan homon.

Vlad. Mašita

Novinky z LIBROSERVO ĈES

Vážení přátelé,
mile nás překvapila Vaše odezva na náš kompletní nabídkový seznam, který byl přetištěn v letošním Startu č. 2/3. Zájem se soustředil především na starší publikace. Protože řada z nich byla jen v omezeném množství, jsou mnohé z nich již vyprodány. Prosíme proto **neobjednávejte již zboží následujících katalogových čísel: C 005, K 204, C 208, "5", C 035, C 036, C 200, C 037, C 123, K 221, K 254, C 126, C 084, C 086, C 018, C 108, C 129, LS 002.**

Zato Vám můžeme nabídnout řadu novinek, převážně z produkce firmy KAVA-PECH:

LS 005 =147.00

La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto. Prelegokolekto de la unua simpozio de la Akademio de Esperanto, Prago 1994.

LS 006 =142.00

Lingvo kaj Kibemetiko. Selektio de la prelegoj pri la lingvo kaj kibernetiko de la 6-a TAKIS-kongreso INTER-KIBERNETIK '93 en Iași (Rumanio)

LS 007 = 29.00

J. Kavka: Ĉu leŭcito en Bohemio? Geologická studie známého geologa-esperantisty o českém leucitu.

LS 008 =140.00

Kazeta: Famaj kantoj por belaj horoj. V esperantu nazpivál M. Smyčka a další.

LS 009 =84.00
Karolo la IV-a: La Propra Biografio.
Tradukis Josef Vondroušek.

LS 010 =0.70
Kalendář 1996. Kartičkový kalendářik
propagující 81. UK v Praze.

LS 011 =129.00
Kraft - Malovec: Esperantsko - český
slovník. Nový slovník středního rozsahu,
který byl již dlouho očekáván.

LS 012 =27.00
Malovec: Gramatiko de la ĉeĥa lingvo.
Příloha nového slovníku pro cizí turisty
u nás.

LS 013 =92.00
H. G. Frank: Mallonga enkonduko en la
Kibernetikan Pedagogion.

LS 014 =186.00
Barandovská: La Latina kiel Interlingvo

LS 015 =38.00
Chrdle: Profesia uzo de Esperanto.

LS 016 =12.00
Tilleux-Disano: Zamenhof. Bildrakonto.
Zamenhofův životopis v kreslené podobě
jako comics v češtině i esperantu v
jednom svazku.

LS 017 =15.00
Doktoro Johano Faŭsto
Loutková hra o Faustovi.

LS 018 =60.00
Čapek K.: La Blanka Malsano
Známé protiválečné drama v překladu T.
Kiliana.

Věříme, že si opět máte z čeho vybrat a
těšíme se na Vaše objednávky!

LIBRARO DE STS-ĈEA

(*daŭrigo*)

La biblioteko de la science-teĥnika
sekcio de ĈEA nun troviĝas je la ad-
reso: Ing. Jan Pospíšil, Petrohradská
3112, 272 04 Kladno.

Matematiko. Natur-sciencoj. UDK 5

F 005: Andrews, F.E.: Ekskurso en
nombroj. 1934, 16 p., Eo

F 138: ČSN 01 0220. Aplikovaná statis-
tika. 1978, 16 p., Cs

I-F 038: Reiers I, O.: Probablokalkulo.
SUK 1976, 84 p., Eo

I-F 037: Reiers I, O.: Konsideroj pri
matematikaj kaj stokastikaj terminoj en
Eo, 1973, 27 p., Eo

I-F 090: Halvelik, M.: Pri gravito kaj
tempo en rilato kun tempovojaĝado kaj
la NIFO-fenomeno. 1967, 68 p., Eo

F 062: Oterma, L.: Pri la kometo 1939
IV P/Väisälä. 1970. 12 p., Eo

I-F 049: Manlibro pri transporto de
fluidaĵoj. 1971, 228 p., Eo

F 019: Tůma, M.: Pri la varmo. (Lum-
kopiaĵo) 1972, 222 p., Eo

F 052: Tůma, M.: Pri la varmo. 1974,
222 p., Eo

F 017: Symboly a názvy fyzikálně
chemických veličin a jednotek. 1971, 54
p., Cs

F 018: Symboly veličin a názvosloví
používané v analytické chemii. 1972, 56
p., Cs

F 066: Pióro, J.: Kemiaj afiksoj
internaciaj. 1966, 40 p., Eo

I-F 040: Pióro, J.: Neorganikaj kaj
organikaj kombinaĵoj. 1970, 44 p., Eo

- I-F 039:** Pióro, J.: Fermentoj. 1970, 16 p., Eo
- F 169:** Ryjov, V.D.: - Gončarov, A.E.: Studo de neakvaj sistemoj per elektro-konduktiva kaj krioskopia metodoj. El: SR 23, 1972, n-ro 1-2, p. 55-66, Eo
- I-F 086:** Gilly, L. - Bisci, R.: Aktiveca mezuro de 14-karbone markita bari-karbonato por scintilantaj ĝeloj. Eo
- I-F 087:** Michaelis de Baenz, J. - Amit, A.: Kristalaj progresoj de la 5 βD glukosido de la "narigenino. Eo
- I-F 089:** Kavka, J.: Pri la klasado kaj nomenklaturado de la fonolitaj rokajoj. 14 p., Eo
- F 008:** Klindt-Jensen, O.: Paco kaj milito dum la ferepoko de Bornholm. El: SR 3, n-ro 4, p. 140-148, Eo
- I-F 151:** Flint, M.: Porfirinoj. SUK 1974, 82 p., Eo
- I-F 088:** Servian, J.L.: Provoj por akiro de 1-toksino markita per I-131. 1963, 4 p., Eo
- I-F 035:** Baka, L.: La rolo de temperatura koeficiento de kondensatoro kaj ties mezurproblemo en diversaj oscilatoroj. 8 p., Eo
- F 168:** Juhász, K.: Historio de la telefonaparatoj. El: SR 30, 1979, n-ro 1, p. 39-46, Eo
- F 099:** Salvo, A.: La rektega fervojo inter Romo kaj Florenco. 1978, 12 p., Eo
- I-F 059:** Ermenkov, K. - Dimitrov, J.: La vagonkonstruado en Popola Respubliko Bulgario. 1968, 12 p., Eo
- I-F 091:** Haszpra, O.: Theory of Hydroelastic Similitude and its Experimental Verification. Doktora disertaĵo, 1976, 110 p., E, resumo en Eo
- F 006:** Wisnovsky, I. - Almassy, E.: La akvo kaj la homo en Hungarlando. 1966, 48p., Eo
- I-F 060:** Petrov, E. - Simeonov, S. - Vličkov, V.: Enkonduko de la elektra kaj disela trakcioj en la Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj. 1968, 12p., Eo
- I-F 061:** Tschom, F.: Aŭtomobil-transportado tra la fervoja tunelo inter Salsburg kaj Karintio. 1975, 16 p., Eo
- I-F 150:** Balech, E.: Planktono kaj mara produktado. SUK 1974, 90 p., Eo
- F 027:** Macukaŭa. Pri la renversita vagonaro en orientnorda Japanio. 1954, 16p., Eo
- I-F 057:** Böhm, E.: Metodoj de aŭtomata influo je trajnveturado, precipe ĉe la Germana Federacia Fervojo. 1967, 36p., Eo
- I-F 024:** Hube, W.: La aŭtomata kuplilo - grava kontribuo al la raciigo de la fervojoj. 1970, 10 p., Eo
- I-F 041:** Kiel Nikolao Kopernik aviadisto fariĝis... 1972, 9p., Eo

Medicino. Tehniko. UDK 6

- F 013:** Modernaj tendencoj kaj evoluoj en medicinaj sistemoj por radiodiagnozo, radio-terapio, nuklea medicino, medicina elektroniko. Eld. PHILIPS, 40 p., Eo
- F 121:** Por tutmonda libera komerco kaj scienca-tehnika progreso. 24p., Eo
- F 159:** Bruin-Kooij, I. de - Wit, A.J.F. de: Energio. 1981. 63p., Eo
- I-F 036:** Elektra fabriko GANZ (1878-1968). 1968, 6 p., Eo
- F 028:** Pawlik, R.: La unua atoma elekotrejo. 1955, 8p., Eo

Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
☆ **STARTO** ☆

NOVINOVÁ ZÁSILKA
Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1

Periodikum Českého esperantského svazu
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
Abonebia ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 15 gld
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno
Ĉeĥa Respubliko

Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s. p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č. j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995